FRANS SCHOOFS (Antwerpen I888-I934) Belga Laŭprofesie direktanta sekretario de l'Antverpena Asocio de l'Malkaraj Loĝejoj" ~~[illegible]~~, kie li dejoris matene, kaj ~~[illegible]~~ jare-ĉe-jare laboregis ~~[illegible]~~ ĉiun posttagmezon eĉ ĝisnokte por Esperanto. Kiel junulo li konatiĝis kun Esperanto (1906) pere de la "Ruĝkoverta Broŝuro ", kiun li poste tradukis en la nederlandan lingvon. De li aperis i.a. traduko de H.Conscience " Kion patrino povas suferi" (I9I3) Kunfondinto de la Esperanto-grupo "La Verda Stelo en Antverpeno" (1907), li fariĝis ĝia prezidanto kaj ĝin kondukis ĝis nekredebla prospero. Li krome estis fondinto kaj post la 1-a mondmilito direktoro de "Belga Esperantisto". Multe li laboris por la kreo kaj disvolvigo de la "Antverpena Polica Grupo" kaj iniciatis la starigon de la eldona societo "Belga Esperanto-Instituto" sur pure komerca bazo kaj prezidis ĝian administrantaron. Ĝi i.a. eldonis "Belga Antologio" (I928) / Ĉefdelegito de UEA. Post la morto de A.J.Witteryck li en I927 iĝis prezidanto de "Belga Ligo Esperantisto" Sur internacia kampo li estis sekretario de "l'Konstanta Reprezentantaro de la Naciaj Societoj", ĉefdeligito de U.E.A. por Belgujo. Li ĉeestis ĉiujn U.K. post la milito, diversfoje kiel reprezentanto de Belgujo kaj estis membro de L.K.K. por la U.K. de I9II kaj I928 en Antverpeno. Ĵus antaŭ lia morto realiĝis laŭ liaj principoj kaj agado la repacigo inter U.E.A. kaj U.F.E. Liaj lastaj vortoj sur la klinika suferlito estis" Dividu la laboron". Dum la enterigo s-ro H.Jakob reprezentis la internacian esperantistaron.

Schoofs (ŝuofs) Frans, belgo, sekr. de Antverpena Asocio de l' malkaraj loĝejoj. Nask. 22 majo 1888, en A., mortis 12 marto 1934 en A. E-isto de la junulaj jaroj. Kunfond. de la EG »La Verda Stelo« en A. kaj estis ĝia prez. pli ol 25 jaroj. Post la militaŭto fariĝis dir. de la »Belga E-isto«, de 1927 prez. de BLE. Fondis kun kelkaj aliaj la eldonan societon BEI kaj prezidis ĝian administrantaron. Ĉefdel. de UEA. Estis sekr. kaj fakte gvidanto de l' Konstanta Reprezentantaro de la Naciaj Societoj. Ĉeestis ĉiujn UK-jn post la milito kaj kunlaboris multe en la organizo de la 7-a kaj 20-a UK-j en A. Estis unu el la plej agemaj en la int. organizo de la movado. Entute: tre amp-

kun Kongresan [illegible]